# T. G. Masaryk

— Emil Ludwig —


Amiko de homaro kaj Eŭropano: tiel mi nomus la prezidanton Masaryk, se ambaŭ karakterizoj ne havus preskaŭ la saman sencon. Ĉar, kiel hodiaŭ sin povus nomi amiko de homaro tiu, kiu kredus je hegemonio de sia nacio, de siaj raso aŭ klaso, anstataŭ je Eŭropo; kaj ĉu Eŭropano, kiu en ĉiuj sociaj problemoj ne sentus pacigeme?

La prezidanto ĝisvivis en sia maljuneco la maloftan feliĉon, ke li vidas, kiel la revoj kaj ideoj fariĝas faktoj kaj ke li kulminaciigas evoluon de pensulo al ŝtatisto kaj reen de ŝtatisto al pensulo. Ĝi estas samtempe sorto kaj merito, ĉar la evoluo donis al li liberecon kaj necesecon, ke li — dum pluraj jardekoj dezirinta, verkinta kaj predikinta pri maniero, kiel oni devus en certa parto de Eŭropo agi ŝtatsaĝe — mem tiel agu; li faris tion kaj li venkis.

Sed li ne faris tion kiel diktatoro, kaj en tio kuŝas lia forto, kiu povas utili kiel modelo. Mi vidas en Masaryk la solan ŝtatiston eŭropan, kiu en tiu ĉi epoko ne difektis la demokratiajn agordojn, sed kondukis sian melodion trans ĉi tiu spaco.

Macdonald, kies portreton mi vidis sur la skribotablo de Masaryk, provas ion similan, sed li ne havas la feliĉon de la komenco, sed nur la feliĉon de la tradicio kaj ĉi tio ne estas tro favora por lia penado.

Kiam tiaj evolucianoj ekprenas la povon, ĉio okazas pli mallaŭte kaj pli malrapide, sed pro tio pli ĝenerale kaj pli daŭre ol dum supreniro de tiuj revoluciaj karakteroj, kies energio facile ŝanĝiĝas en aŭtokration, kaj kiuj eble nur tiel povas atingi siajn ŝtatajn celojn. Pater Patriae*) povas ja esti nomata nur pensulo, ne soldato; soldato devus esti tre maljuna kaj matura, aŭ li devus esti belega escepto kiel Washington. Popola deveno donos al li por tio pli da kapabloj, ol aneco al privilegiita klaso, kaj ke hodiaŭ en ĉiuj landoj de la tuta mondo, ankaŭ en la malnovaj, regas burĝoj, en multaj eĉ filoj de laboristoj, estas fakto same signifoplena, kiel la transformiĝo de la lastaj kvar monarĥioj en dekses respublikojn.



Jan Ŝtursa: *Prezidanto Masaryk*

Inter ĉiuj mi vidas Masaryk starantan sur ŝtupo morale plej alta: li estas vera popolgvidanto laŭ tipo de malnovaj amerikaj prezidantoj, kaj ne estas hazardo, ke li estimas kaj studis ilin. Kun Lincoln li havas la saman popoldevenon, bonhumoron kaj kuraĝon, fortikan, longan korpon, moderecon, homan saĝon kaj bonecon; jes, oni oni ankaŭ povas pri li diri, ke li helpis gvidi civitanan militon kaj ke li venkis ĝin. Sed poste la sorto gardis lin antaŭ kugloj de liaj malamikoj kaj permesis al li fariĝi reganto de tio, kion li prirevis kaj kion li poste militakiris. Ni rajtas lin kompari ankaŭ kun Marcus Aurelius, kiu subigis la povon al la spirito, ĉar li estis unuavice filozofo kaj nur poste regnestro. »Agi estas facile, pensi estas malfacile, agi laŭ pripenso estas maloportune.« Ĉi tiuj vortoj el la lernatesto de Wilhelm Meister enhavas la spiritajn aventurojn de Masaryk.

El miaj germanaj samnacianoj, kiuj estis enigitaj en lian ŝtaton, multaj certe estas liaj kontraŭuloj. Sed nia tasko ne estas taksi ŝtatiston laŭ avantaĝoj, kiujn li havigas ĝuste al ni; alie ni germanoj devus taksi Nitti pli alte ol Mussolini, Caillaux pli alte ol Clemencau, Casement pli alte ol Grey kaj Czernin pli alte ol Masaryk; ĉar ĉi tiuj malprofitigis la germanojn, dum tiuj volis utili al ili.

En la tempo, kiu iom post iom denove instruas kredi je la venko de l' spirito super la forto, ni havas la devon montradi je viroj, kiuj estas spirite ligitaj kun la jarcento, kvankam ilia efikado restas nekompleta. Kiam mi demandis al Bernard Shaw, kiu povus fariĝi prezidanto de Unuiĝintaj Ŝtatoj Eŭropaj, li rediris: Masaryk.

Tradukis *O. Sklenčka.*

*) Patro de la Patrujo.